PILO-PRESS
Internacia Informservo
N-ro 48/77 - 15 dec 1977
Aperas ĉiusemajne

PILO-PRESS deziras al ĉiuj legantoj kaj amikoj Bonan Kristnaskon kaj ĉion bonan en la NOVA JARO

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

En la tago de la 15-a de decembro

Antaŭ 118 jaroj naskiĝis d-ro L.L. Zamenhof. En la jaro 1887 d-ro L.L. Zamenhof eldonis la unuan libron de Esperanto. Esperanto do fariĝis ĉi-jare 90-jara. Kion la aŭtoro de Esperanto pensus hodiaŭ pri Esperanto kaj speciale pri la esperantistoj de la jaro 1977? Ni tion ne scias; ankaŭ ne havas multe da senco mediti pri tio.

Ĉiukaze multaj aferoj en Esperanto ne jam ŝanĝiĝis. Ŝajnas , ke ni ĉiam ankoraŭ troviĝas en la stadio de propagando. Kaj ĝuste por propagando kelkiuj esperantistoj elspezas grandajn sumojn da mono sen vera kontrolo de la efikeco. Kompreneble, informado kaj varbado estas necesa, sed varbado kaj informado restas senefika se ĝin ne akompanas samtempa esperanta vivo kaj speciale kultura kaj praktika agado en Esperanto. Kaj ĝuste por la kultura agado la plej multaj esperantistoj ne havas monon. Unuflanke oni fanfaronas pri "milionoj da esperantistoj", aliflanke tiuj samaj "milionoj da esperantistoj" ne povas konsumi florantajn literaturajn kaj kulturajn gazetojn en Esperanto. Kaj la modestaj provoj tiurilataj vegetas en kelkcentaj ekzempleroj. Ni eĉ ne parolas pri Esperanto-libroj, kiuj nun - kun kelkaj esceptoj - eldoniĝas en malgrandaj eldonkvantoj, ofte fotorepresitaj. Kompreneble mi scias pri la kostoj hodiaŭaj kaj la neeblo de pli ol la duono de esperantistoj aboni la revuojn kaj aĉeti la librojn, pro devizaj kaŭzoj. Sed se la situacio tiele estas, oni ne parolu pri "milionoj da esperantistoj", kiuj fakte ne ekzistas.

Unu el la malfortaj flankoj de la Esperanto-laboro estas la nekonstanteco. Agantoj aperas kaj malaperas. Kaj ĉiu nova kunportas "novajn ideojn", kiuj antaŭ li - antaŭ 20, 40 aŭ 60 jaroj - aliaj jam fakte realigis aŭ provis realigi. Oni enkondukas novajn "malnovajn" metodojn, estas fieraj pri la komencaj sukcesoj, sed post kelkaj jaroj ĉio restos la sama.

En enketo mi demandis multajn esperantistojn la jenajn demandojn:

Ĉu vi lernis Esperanton? Ĉu vi parolas Esperanton? Ĉu vi korespondas en Esperanto? Ĉu vi partoprenas Esperanto-aranĝojn? Ĉu vi legas Esperanto-literaturon? Ĉu vi legas Esperanto-revuojn? Ĉu vi aŭskultas al Esperanto-elsendoj? Ĉu vi estas membro de Esperanto-organizaĵoj?

Kaj jen la rezultoj. Multaj el la demanditoj respondis je ĉiu demando kun "ne", kvankam laŭ ili oni nomu ilin "esperantistoj". En kio do, ekzistas ilia esperantisteco? Ili ne lernas, ili ne korespondas, ili ne legas, ili ne aŭskultas Esperanton, ĉar ili ne havas tempon. "Mi ne havas tempon", tiu esprimo estas la plej granda malamiko de Esperanto en la nuna tempo. Esperanto estas lingvo; por lingvo oni devas havi tempon. Tiam ĝi ankaŭ floras kaj prosperas.

Sedni ne forgesu unu vere grandan pozitivan rezulton de la jaro 1977. Tio estas la ĉeesto de la Islanda Ŝtatestro, d-ro Kristján Eldjárn, kaj de la ĝenerala direktoro de UNESKO, s-ro Amadou-Mahtar M'Bow, en la inaŭguro de la ĉi-jara Universala Kongreso de Esperanto. Ĉi tiuj faktoj donis multan rekonon el Esperanto. Sed Esperanto tamen progresas kun la oficiala rekono kaj la ĉiam pli kreskanta bazo de Esperanto-parolantoj. Ni do pligrandigu la nombron de la Esperanto-parolantoj.

Kaj ĉiuj sferoj de Esperanto-agado progresos!

Pri la "Trigroŝa Romano"

Nürnberg (pp) - Pilo-Press jam raportis pri la apero de la Esperanto-traduko de TROGRIŜA ROMANO de Bertolt Brecht, en licenceldono de Bleicher-Verlags-KG, Gerlingen, por la nesocialismaj landoj.

Laŭ interkonsento inter Bleicher-Verlags-KG, Gerlingen, kaj Ludwig Pickel, Libroservo, Nürnberg, la liveradon de la libro al ĉiuj klientoj en la nesocialismaj landoj, inkl. la libroservoj, transprenis

Ludwig Pickel, Libroservo, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1.

Ĉiuj interesuloj pri la libro do turnu sin al la supra libroservo. Ankaŭ la libroservoj en nesocialismaj landoj skribu al la libroservo Ludwig Pickel.

Ludwig Pickel, Libroservo, donas al ĉiuj revendistoj la samajn rabatojn kiel la eldonejo, nome:

| | | |
|---|---|---|
| 1 - 5 ekz. | 30 % | rabaton |
| 6 - 10 " | 33 1/3 % | " |
| 11 - 25 " | 35 % | " |
| pli ol 25 ekz. | 40 % | " |

Al la fakturkostoj aldoniĝas la faktaj sendkostoj.

Ni ripetas por mendintoj la bibliografiajn indikojn:

Trigroŝa Romano de B. Brecht, tradukis ĝin d-ro Karl Schulze kaj lingve kontrolis Jerzy Grum, formato 12 x 19,5 cm, tole bind., 372 paĝoj, prezo 32,-- DM

Noto: Bleicher Verlags-KG, Gerlingen, kaj Ludwig Pickel, Libroservo, Nürnberg, havas la ekskluzivan rajton vendi la libron je la fiksita prezo en ĉiuj ne-socialismaj landoj, inkl. al libroservoj.

Marienkalender

Ĵus aperis la konata "Marienkalender", jubilea eldonaĵo, en Luksemburgo. Ĝi aperas ekde 100 jaroj. La kalendaro 1978 enhavas du paĝojn kun raporto en vorto kaj bildo (en germana lingvo) pri la Esperanto-Centro Luksemburgo kaj la laboro de Luksemburga Esperanto-Asocio. La kalendaro kostas 200 belgajn frankojn aŭ 13 germanajn markojn. Interesiĝuloj mendu ĉe Pastro Hansjörg Kindler (Trixini), Postfach 628, Luksemburgo, Pĉk. Luksemburgo 5088-44.

Pri "Eŭropa Dokumentado"

Paderborn (pp) - Laŭ informoj de Eŭropa Klubo Paderborn la revuo "Eŭropa Dokumentado", kiun ĝis nun eldonis la Informa Servo de la Centro por Eŭropa Edukado en Bruselo, ekde la jaro 1978 aperos en la eldonejo de Eŭropa Klubo, Paderborn.

Interesuloj pri la revuo turnu sin rekte al Eŭropa Klubo Paderborn, Grunigerstr. 5, D-4790 Paderborn.

Libroservo Ludwig Pickel Nürnberg ne plu akceptos abonon por ĉi tiu revuo.

Pri kongresa vojaĝo 1978

Interesuloj, kiuj intencas partopreni la Universalan Kongreson en Varna kaj serĉas favoran flugvojaĝeblecon, turnu sin rekte al Eŭropa Klubo Paderborn. La flugprezo Frankfurt - Varna - Frankfurt laŭ informo estos 347 GM.

Pri Zamenhof-festoj

En multaj lokoj, de Bremeno ĝis Varsovio kaj Vieno, okazis ĉi-jare denove Zamenhof-festoj. Ni ne povas mencii ĉiujn. Pli detale ni volas raporti ĉi tie pri la Zamenhof-festo en Munkeno de la 17-a de decembro, kiun ni persone ĉeestis kun ampleksa librostando.

Sendube la Munkena Zamenhof-festo estis - laŭnombre - unu el la plej grandaj. Ĉ. 70 personoj, inter ili multaj gejunuloj, ĉeestis la feston, ili aŭdis la enkondukojn vortojn de Josef Weidacher, rigardis la filmojn de W. Barnickel pri Frankfurto kaj Norvegio kaj aŭdis la diversajn elpaŝojn kaj surpr-izojn de Reinhold Maier.

Granda loterio donis certe profiton kaj bonajn gajnojn al partoprenantoj. Virinaj esperantistoj de Munkeno zorgis pri manĝaĵoj kaj trinkaĵoj.

En numero 4 de Eŭropa Esperanto-Revuo ni pli detale - en vorto kaj bildo - raportis pri la informa agado de Munkena Klubo. Sendube, la sukcesa trapaso de la ĉi-jara Zamenhof-festo estas la bona rezulto de la kelkjara informagado.

Pri Esperanto in Rumanio


Bukareŝto (pp) - Nur malofte oni aŭdas pri Esperanto en Rumanio. Ni ĝojas ke ni povas hodiaŭ prezenti eltranĉaĵon el la rumana gazeto "Flagara" (Flamo), novembro 1977 kun informoj pri Esperanto okaze de la 90-a datreveno de la naskiĝo de Esperanto. La materialojn sendis al la redakcio S-ro Jenö Zagóni, UEA-delegito el SFinto Gheorghe kaj PIlo-Press-leganto.

La revuo "Flacara" aperas en Bukareŝto en eldonkvanto de 200 000 ekz.

**Esperanto 90, breviar**

— acum 90 de ani a fost inițiată de polonezul L. L. Zamenhof - limba internațională esperanto;
— pînă azi peste 40 000 de cărți beletristice și științifice au apărut în această limbă;
— peste 100 de ziare și reviste sînt editate în esperanto;
— 2 000 manuale au apărut în 88 limbi, iar numărul dicționarelor tehnice este de peste 150;
— 25 de stații radio din 20 țări (printre care Sofia, Viena, Pekin, Roma, Zagreb, Varșovia) emit programe în limba esperanto;
— organizațiile turistice și de transport, firme de renume mondial (Fiat, Philips, Škoda etc.) corespondează, editează materiale de informare în această limbă;
— Asociația Universală Esperanto este în relații consultative cu UNESCO, iar Asociația Mișcarea Esperantistă pentru Pace cu Consiliul Mondial al Păcii;
— arta și literatura românească sînt răspîndite în întreaga lume și prin această limbă;
— în cadrul universităților populare din București, Brașov, Cluj-Napoca... funcționează și cursuri de limba esperanto;
— revista studențească Napoca-Universitară publică încă din anul trecut curs de esperanto

(Eugen Zagoni)



În fotografii, două volume de cunoscuți autori români traduse în esperanto

**************

Por germanlingvanoj

Laŭ informoj de Günther Becker kaj de Sarlanda Esperanto-Ligo la konata eldonejo Georg Olms nun preparas la eldonon de la germana versio de la franca poŝlibro L' Espéranto de Pierre Janton sub la titolo:

Einführung in die Esperantologie.

Tradukis ĝin Günther Becker. La germanlingva libro baldaŭ aperos. La prezo ne jam estas konata.

Tamen jam nun ni akceptas antaŭmendojn. Kiu interesiĝas pri la libro en germana lingvo, tuj skribu al Ludwig Pickel, Libroservo, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg.

Krome ni ofertas:

| | |
|---|---|
| Wir lernen Esperanto mit Schlüssel de Wingen | 9,90 DM |
| Esperanto einmal anders de Auld | 9,-- DM |

Baldaŭ denove aperos - en eldono de SEL -"Post la kurso" kaj la vortaro Deutsch-Esperanto de Wingen. Por ambaŭ libroj jam nun ni akceptas antaŭmendojn.

La semajna komentario el Aŭstrio

Ĉi-sekve ni publikigas la semajnan komentarion verkitan de Werner Schmidt, disaŭdigitan la 10-an kaj 11-an de decembro:

"Pasis sep jaroj ekde kiam surpriza balot-rezulto ŝokis ambaŭ aŭstriajn grandpartiojn: La venkintajn socialistojn apenaŭ malpli ol la venkitan Popolpartion.

Sed dum la socialistoj, gvidate de la superrege populara kanceliero Bruno Kreisky, alkutimiĝis al siaj novaj taskoj kaj respondeco, la ŝoko ankoraŭ pluefikas en la vicoj de la Popolpartio, kiun ĝia nova gvidanto, Josef Taus, pli kaj pli seniluziigas, nek laŭ populareco nek laŭ kapablo povante atingi la kancelieron.

Diversaj esplorinstitutoj pri la publika opinio tre malsame prijuĝas la ŝancojn en la preskaŭ nur ĵus okazintaj lokaj balotoj de Burgenland. La unuj laŭtege profetis venkon de la popolpartia ĉefo Taus. Tamen Taŭs imprese malvenkis.

Kanceliero Kreisky, kiu, fidante la opiniesploron de sia centralsekretario Blecha, estis kviete atendinta la konfirman rezulton, proponis nun, ke estonte ambaŭ partioj komune ekzamenu la opiniesplorojn - per aparta komisiono. Ĝis nun la popolpartio ne reagis al tiu propono.

Sed ĉu ne estas vere troa postulo, ke la opozicio je regulaj kelkmonataj intertempoj atestu al la kanceliero, ke lia stelo ankoraŭ lumas aŭ denove ekbrilas? "

************************

Ne forgesu la Esperanto-elsendojn!

Dum la tuta jaro la Esperanto-elsendoj praktike uzas Esperanton. Kaj nur malmultaj esperantistoj rekonas la gravecon de tiuj elsendoj por Esperanto. La jarfino ĉiukaze estas bona okazo por sendi al la Esperanto-redakcioj dank- kaj salutkartojn! Jen la adresoj:

ORF, Esperanto-Redakcio, A-1136 Wien
Radio Roma, Esperanto, C.P. 320, I-00182 Roma
Pola Radio, Esperanto-Redakcio, P.O. Box 46, PL-00950 Warszawa 1
Svisa Radio, Kurtondo, Esperanto, CH-3000 Bern 15
Radio Vatikana, Esperanto-Redakcio, Piazza Pia 3,I-00193 Roma
Radio Zagreb, Esperanto, YU-41000 Zagreb
Radio Pekino, Esperanto, Pekino, Ĉinio
IBRA-Radio, Box 396, S-101 25 Stockholm

Ne forgesu! Skribu tuj, hodiaŭ!

****************************




Ne nur Stefanie kaj Gerald Tucker (vidu la ilustraĵon apude!), sed la tuta Loka Kongresa Komitato de Augsburg deziras al la esperantistoj Gajan Kristnaskan Feston kaj ĉion bonan por la Nova Jaro!
Ili atendas amasan aliĝon al la 56-a Germana Esperanto-Kongreso pentekoste 1978 de la 12-a ĝis la 16-a de majo 1978!
Venu do amase al Augsburg!